

Kio estas estonteco de IKEF?

Prezidanto Ĉielismo WANG Tianyi

---prelego por la 4a Komunua Konferenco de IKEF

Karaj IKEFanoj kaj partoprenantoj,

Unue, mi devas doni al ĉiuj partoprenantoj sinceran saluton okaze de la historia momento, kiam unuafoje nia jarkunveno – la 4a komuna konferenco de IKEF okazas en virtuala kunvenejo per Zoom, kaŭze kontraŭ la monda pandemio.

Due, mi devas danki al ĉiuj partoprenantoj vian ĉeeston de nia jarkunveno – la 4a komuna konferenco de IKEF, ĉar vi ĉiuj estas kuraĝaj ankaŭ aliĝi al nia konferenco malgraŭ tio, ke ekzistas grandaj horodiferencoj inter diversaj regionoj, kaj la pandemio ankoraŭ aktivas en la mondo.

Fakte pro la pandemio tra la mondo diversaj problemoj evitendiĝas pli fortaj ol iu ajn tempo. Ankaŭ same okazas malfaciloj kontraŭ nia movado de Esperanto, ke diversaj planitaj renkontiĝoj kaj kunvenoj estas rezignitaj ekz. ankaŭ niaj antaŭeplanitaj la 4a KK en Kioto, Japanio, kaj kultura aranĝo en Mongolio kaj Uzbekio, kiuj devas prokrastiĝi al venontaj jaroj ne finfiksitaj laŭ nuna situacio. Krom tio ni ankaŭ vidas faktan ke Esperanto-movado malpotenciĝas en Eŭropo, kie naskiĝis Esperanto, kaj delonge ĝia mondcentralismo kiel origina motoro disvastigis Esperanton tra la mondo. Sed nun pro diversaj kialoj ekonomiaj, politikaj kaj medinaturaj ĝi jam ne havas tian energion kaj ambicion organizi mondan Esperanto-movadon, ĉar nuntempe ili devas zorgi sian vivtenon kaj kongruon al la nova epoko kun diversaj novprosperaj mondcentroj. Sed pro historia inercio de la mondcentralismo ili ankoraŭ ne povas rapide aŭ racie kongrui al la aktuala mondo. Tio donas al la monda Esperanto-movado negativan influon. Kion fari je tia stato kaj situacio?

Mi proponas:

1, **Strategio**: IKEF devas pacience kaj persiste labori laŭ sia statuo kaj strategio por prepari kaj konstrui mondan strukturon de aplikado de Esperanto por internacia ekonomio kaj komerco. Tio estas ĝenerala strategio de nia laboro ne ŝanĝonta en la longa estonteco. Ni ĉiuj laboru kune por la granda celo.

2, **Landfilio**: Por realigi la strategion IKEF devas memserĉi diverslandajn aktivulojn por fondi landfiliojn eĉ portempe virtualajn laŭ malsamaj kondiĉoj en la mondo. La ekonomio-komerca afero bezonas

amasan kaj sisteman efikon, kaj estu ju pli multe da filioj, estos des pli ŝancoj kaj fruktoj al Esperanto-aplikantoj. Per tia amaseco kaj sistemo ni povos montri al la ekstera socio nian potencon, kaj donos al esperantistoj aplikajn ŝancojn tra la mondo. Krom fondi novajn landfiliojn IKEF ankaŭ devas agiti dormantajn filiojn kaj IKEFanojn partopreni nian kunagadon kaj aranĝu sian regulan kunvenon. Tion respondecas la tuta estraro, kaj aliloke ni diskutos pri la problemo.

3, **Zoom-kunveno:** Por prepari ĉi tiun konferencon ni jam regule okazigis ĉiudimanĉon Zoomkunvenon tri monatojn kadre de IKEF. Per tio IKEF gajnis sperton kaj prestiĝon en Esperantujo, kaj trejnigis multajn personojn kapable uzi la videoprogramon Zoom, kiuj nun jam fariĝas nia bazforto. IKEF devas daŭrigi la ĉiudimanĉan Zoom-kunvenon, kaj plie devos prezenti konkretajn temojn ĉu specialajn varojn aŭ turismajn lokojn. Per tiaj prezentoj oni povos fari konkretajn kaj efikajn kunlaborojn. Ĉiuj devas anticipi sendi al IKEF sian prezentaĵon kun teksto, foto eĉ video. IKEF anoncos tiajn prezentojn plifruo laŭ petovico. Mi kredas, surbaze de la pasintaj lecionoj nia Zoomkunveno allogos pli multajn interesantojn kaj fariĝos brila fenestro de IKEF tra la monda Esperantujo.

4, **Turismo:** Hodiaŭ la turismo jam ne estas simpla ekskurso, sed organizado por komerca vojaĝo, vilaĝa vojaĝo, fabrika vojaĝo, kunvena aranĝo, ekspozicia foiro k.t.p... Ĝi jam fariĝas grava parto de la nacia ekonomio en la tuta mondo. IKEF devas profesie organizi la turisman entreprenadon, kaj devas okupi portempan vakecon de ĉi tiu kampo post forpaso de sro Andreo Grzębowski E-turisma animulo nome de MT kaj Esperantotur, ĉar la turismo ankaŭ apartenas al la ekonomikomerca fako. Por tio IKEF atendas kunlaboron kun ĉiuj esperantistoj.

5, **Esperanto-varo:** La varoproduktado estas bazo por la komerco, kiu povas gajni profiton el la varo. Pro tio IKEF proponas al siaj membroj oferti siajn varojn konkretajn kun prezokonkurenco en la merkato. Nun la mondo jam estas kunligita de rapida interreto kaj facila trafiko. En ĉiuj vendejoj abundas varoj el diversaj landoj. IKEF demandas, kio kaj kie estas niaj varoj kaj markoj? Certe mankas en la merkato. Ĉu ne ekzistas? Certe ekzistas? Sed ili ne efike cirkulas en la merkato. IKEF vokas al siaj membroj kaj ĉiuj esperantistoj fari siajn varojn kaj produktaĵojn, kaj IKEF povas helpi vian cirkuladon kaj vendadon.

6, **Membrokotizo:** Ni devas konfesi tian fakton, ke la virtuale interreta socio jam grandparte kaj senpage forprenis la funkcion de la tradicia societo kiel esperantistaj organizoj. Fakte, ĉiuj esperantistaj organizoj situas je financa krizo. Kion fari? Mi postulas, ke minimume la estraranoj kaj

aktivuloj devas pagi la individuan membrokotizon laŭ la statuto de IKEF, ĉar la oficiale virtuala kunveno ankaŭ devas pagi al la retroserva kompanio Zoom, kiam ni ĝuas ĝian oportunecon por nia aktivado. Alie, IKEF povas esplori eblecon eldoni simbolajn valutojn cirkulontajn tra Esperantujo. Je sia kredito IKEF ŝanĝos sian malfacilan financon. Resume, ni devas fari firman bazon por estonteco de IKEF! Tio dependos de ni ĉiuj, kiuj volas konstrui la mondan sistemon por apliki Esperanton. Mi kredas ke je viaj kunlaboroj kaj kontribuoj IKEF havos brilan estontecon.

Koran dankon pro via ĉeesto kaj aŭskulto!

Okaze en la 4a KK, la 26a de Dec. 2020